

La Statuto de la Indonezia Esperanto-Asocio

I. Nomo de la asocio

1.1 La nomo de la asocio estas Indonezia Esperanto-Asocio; ĝia mallongigo estas IEA (indonezie: *Asosiasi Esperanto Indonesia*).

1.2. IEA heredas la historion de IEA fondita en 1952.

1.3. IEA reprezentas la esperantistojn de Indonezio ĉe aliaj asocioj kaj instancoj.

II. Celoj kaj agadkampoj

2.1 IEA celas

- disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- plifaciligi ĉiuspecajn interhomajn rilatojn malgraŭ diferencoj de nacieco, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, helpi la enlandajn Esperanto-grupojn kaj disvolvi ĉe la membroj komprenon kaj estimon por aliaj popoloj;
- konsciigi la socion pri la valoro de Esperanto kaj pri ĝeneralaj lingvaj problemoj.

2.2 Agadkampoj:

- informado
- edukado
- praktikado

2.3 IEA ne estas profitcela asocio. Ĝi faras profitdonajn agojn nur por realigi siajn difinitajn celojn.

III. Membroj

3.1 Membro de IEA povas esti ĉiu natura persono, sendepende de nacieco, religio, politika vidpunkto.

3.2 La membro kiu agas kontraŭ la normoj de la statuto povas esti eksigita per decido fare de la estraro; kaze de apelacio decidas la sekva ĝenerala kunsido.

IV. Organizo

4.1 La plej supra decida organo de IEA estas la ĝenerala kunsido. La estraro kunvokas la ĝeneralan kunsidon almenaŭ ĉiujare unufoje. La membroj devas esti informitaj pri la dato kaj la tagordo plej laste du monatojn antaŭe.

4.2 La membroj de IEA elektas estraron de 5 ĝis 9 membroj. La estraro

organizas, kunordigas kaj reprezentas la agadon de IEA.

4.3 La estraro elektas inter si minimume prezidanton, sekretarion kaj kasiston kaj laŭbezone ankaŭ vicprezidanton.

4.4 La ĝenerala kunsido elektas du financajn revizorojn kiuj ne estas membroj de la estraro.

4.5 La bazaj taskoj de la estraro estas la jenaj:

- a) informi la membrojn pri enlanda kaj eksterlanda Esperanto-agado
- b) organizi landajn kaj internaciajn Esperanto-aranĝojn;
- c) eduki kaj trejnadi la aktivulojn.

4.6 La estraro devas raporti al la ĝenerala kunsido pri sia agado.

4.7 La estraro povas nomumi komisiitojn en difinitaj regionoj kaj fakoj.

V. Balotado

5.1 Ĉiuj membroj de IEA rajtas partopreni la balotadon.

5.2 Kunveno pri reelektado de funkciuloj okazas en ĉiu tria jaro en la ĝenerala kunsido.

5.3 La kvorumo por la ĝenerala kunsido pri reelektado de funkciuloj estas triono de la membroj de IEA.

5.4 Membro de IEA rajtas komisi sian voĉdonrajton al ĉeestonta membro per subskribita letero al la prezidanto de IEA minimume du semajnojn antaŭ la ĝenerala kunsido.

VI. Financo

6.1 La estraro ellaboras ĉiujare sian aktualan financon raporton. La revizoroj raportas la rezulton de la financa kontrolo al la ĝenerala kunsido.

6.2 La membrototizo estas fiksita en la membroregulo.

VII. Aldonaĵoj

7.1 Nur la ĝenerala kunsido rajtas modifi la statuton.

7.2 Por povi modifi la statuton de IEA estas bezonata du-triona plimulto de la ĉeestantoj.

7.3 Ĉiujn pliajn detalojn de la funkciado de IEA difinas la apartaj reguloj.

7.4 La unua statuto estas aprobata de la ĝenerala kunsido la 7an de aprilo 2013 dum la unua Indonezia Esperanto-Kongreso.